



Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

<http://www.distrto.com/esperanto/k38.htm>


<http://www.dragonfire.net/~Esperanto/k38.htm>



N° 38

Aprilo/Junio 1998

Kajeroj



el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: **Martín Bustín Benito.**

Apartado de Correos 4143
ES03080 ALICANTE

Vicprezidanto: **María del Mar Guirao Gallego**

Avdª Juan Carlos I, 22-8ª-H,
30800 LORCA (Murcia)
Hispanio.

(Peranto de SAT:

konto 1302-0482-99-0023052950)

Sekretario: **José Pina Tuells,**
c/ Stª Teresa, 22-2º CD,
ES30005 MURCIA

Kasisto: **José María Bernabéu Franco**

Gral. Primo de Rivera, 8
E-03360 Callosa de Segura,
ALICANTE (Hispanio).

Libroservo: **Nicolás Gil Carballo,**

Apartado 305
ES24080 LEÓN

Redaktoro: **Jesuo de las Heras,**

Apartado 4461
ES30080 MURCIA

Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la
**nova konto n° 1302 0412 86
0022655110** en libreta de Caja Postal.
Sen aldona kosto. La abono kostas 1000
pesetojn. Kvintancon oni ricevos.

Pretigas la Kajeron:

Provkorekto: **José Pina Tuells,**

Administro: **Juan Antonio Cabezas
Martínez,**

Redakto: **Jesús de las Heras Jiménez.**

Kovrilo: Mejlŝtona signo por Esperanto.

Enhavo

Redaktore	3
Informoj de la Prezidanto	4
Akto de la lasta kunveno de HALE	5
Sendungeco kaj Bonfarta Socio,	6
Nova konstanta songazeto Pola Stelo.	8
Eŭropradikaj altnivelaj vortoj en Esperanto	9
Ankoraŭ pri la Intercivitana Milito	11
Pri la kredo kaj Dio	15
Pri homa kaj dia:	16
Nia diskaro	16
La retirigo de la volontuloj internaciistaj	17
Kutime Faritaj Demandoj!	20
Levante esperanta	22
Nia Ponto kaj vero	23

Oni povas
reprodukti
artikolojn,
kondiĉe ke
oni citu la
originon.

Ni ne korespondas
pri nepetitaj artikoloj.
Tamen, ni klopodos
publikigi ĉiun artikolo-
lon kies enhavo estas
interesa kaj ne mis-
traktas iun ajn per-
sonon.

Pri la enhavo de
la artikoloj
respondecas la
aŭtoroj mem, ne la
redakcio.

Redaktore

Unue, mi devas pardonpeti al legataro pro la prokrasto de ĉi tiu **Kajero**. Ĝi aperas unu monaton post sia akurata dato, kaj kvankam ni provis disdoni ĝin antaŭe, ni ne sukcesis.

Kvankam ne ĉiujn konvinkas, estas nova programo por esperantistigi ĉiun tiparon -almenaŭ en Windows-, kaj tial ni povas finfine verki en Esperanto sufiĉe malmultekoste kaj rapide. La programo nomiĝas **Supersigno**, kaj estas farita de aŭstralianoj Jeff kaj Mark Hayward, kies retadreso estas



La Esperanta tiparilo por
Windows 3.11® and Windows 95®

© 1997 Jeff & Mark Hayward

blink@pnc.com.au. Vi povas trovi la programon en adreso <http://www.pnc.com.au/~blink/supersigno/index.html>. La programo kostas nenion, vi nur devas sendi bildkarton al la aŭtoroj, dirante, ke vi uzas ilian programon.

Ni informas pri nia lasta kunveno, okazinta en Februaro, kaj ties decidoj. Nia kamarado Giordano Moya Escayola verkis ĉi-foje pri sendungeco kaj bonfarfta socio, kaj pri eblaj solvoj al tiu problemo (paĝo 6-a).

André Pretty sciigas nin je paĝo 8-a pri interesa novaĵo por ĉiuj, kiuj plendas, ke estas malfacile trovi geesperantistojn por paroli, aŭ almenaŭ por aŭskulti la lingvon. Magazino por blinduloj kreskas kaj iĝas sona magazino malmultekosta, ege rekomendinda por plibonigi nian *akcenton!* Aliflanke, kritikoj venas el Oriento ĉi foje: nia kamarado Gotou Humihiko, el Japanio, plendas, ke Esperanto estas facila ilo por okcidentanoj, kaj li klarigas sian plendon pere de ekzemploj vortaj (paĝo 9-a). Ankaŭ plendas Antonio Marco Botella pri mislego pri nia Intercivitana Milito (paĝo 11-a).

© 1997 Jeff & Mark Hayward

© 1997 Jeff & Mark Hayward

© 1997 Jeff & Mark Hayward

© 1997 Jeff & Mark Hayward

© 1997 Jeff & Mark Hayward
© 1997 Jeff & Mark Hayward
© 1997 Jeff & Mark Hayward
© 1997 Jeff & Mark Hayward

Ni prunteprenas artikoleon aperinta en **Laŭte!** pri junularo, kiun mi esperas, ke vi ĝuos (paĝo 14-a). Ĝiinda artikolo ankaŭ estas tiu de Matthias M. Liszt pri kion oni kredas (paĝo 15-a). Kaj kredoj ankaŭ originis nian diskan rekomendon ĉi

monate (paĝo 16-a). Nia kamarado Luis Serrano finas sian artikolon pri la **Voluntuloj Internaciistaj** en paĝo 17-a, dum Olga López preskaŭ finas ankaŭ sian interesan serion pri *Kutime Faritaj Demandoj kaj sedoj al Esperanto* je paĝo 20. Finas la *Kajero* per gravega novaĵoj: Esperanto havas novan placon en orienta Hispanio! (paĝo 22-a).

Mi esperas, ke vi trovos nian laboron interesan, kaj atendas vin post du monatoj. Ĝis.

Informoj de la prezidanto

Nek pesimismon nek triumfalismom. Ĉu en la aktuala socia situacio oni povas reale juĝi la laboristajn problemojn? Ni ĉiuj konsentas ke senlaboreco estas gravega situacio por laboristoj. Senigitaj de siaj salajroj ili eniras en novan socian klason: La almozuloj de la ŝtato, kiam ili povas ankoraŭ havi tiun ŝancon. Nun, laŭ la statistikoj en la Eŭropa Komunumo, ekzistas 20 milionoj da senlaboruloj al kiuj oni povas aldoni kelkajn pliajn milionojn da ties familianoj kiuj ankaŭ suferas la konsekvencojn de mizera situacio.

Niaj politikaj gvidantoj havas pli aŭ malpli la saman gurdajon en ĉiuj landoj: *Baldaŭ ni eliros el la tunelo. Venontjare la situacio de senlaboruloj estos plibonigita. Ni*

Petas korespondanton pri ĉiujn temoj:

Miguel Ángel Caridade Praça
R. rocha Peixoto n° 41-Boaçù
Sao Gonçalo - R.J.
Brazilo- Brazil,
CEP-24467-190

kreos labor-postenojn por dungi centmilojn da laboristoj. Sed tiuj promesoj ĉiuj povas konstati ke estas MENSOGOJ. Senlaboreco pli kaj pli kreskas, kio estas logika konsekvenco de la aplikado de modernaj sistemoj de produktado en ĉiuj laboraj kampoj, kaj tio-ĉi daŭros. La progreso ne haltos.



Antaŭ tiu-ĉi socia panoramo estas penige vidi kiel obstine la senlaboruloj postulas laboron kiu nek ekzistas nek ekzistos. Ni ne devas postuli sklavecon kiam aliaj solvoj pli justaj ekzistas. Kompreneble tiujn solvojn aplikos nek la ŝtato nek la kapitalistoj. Eble iam la premo de organizitaj senlaboruloj, helpataj de ĉiuj homoj kiuj deziras vivi en plej frateca kaj justa socio, fariĝos sufiĉe forta por ke la nuna ĥaosa socia sistemo estu ŝanĝita al pli regula kaj homa. Tiel estu.

Kamaradecaj salutoj de,

*Marteno
Alikanto*

la 8-an de Aprilo de 1998

Akto de la lasta kunveno de HALE

Ni kunvenis ĉe la *Mesón del jarmón* (Restoracio de ŝilko) je la 23-a de februaro de 1998 je la 11-a horo.

Ni akordis pagi je ricevo la kvintancon de **Esperanto Hispanio**, kaj daŭrigi la jarajn pagojn samkiale. La paŝvorton de la paĝo sekve gardas la sekretario, kaj iu ajn ŝanĝo pri ĝi ankaŭ li konos.

La prezidanto, k-do Marteno Bustín, diris, ke *Oni publikigu en Kajeroj el la Sudo la rimarkojn aŭ kritikojn pri HALE aŭ SAT, kiujn oni devos adresi al la sekretario de HALE, k-do José Pina Tuells.*

Oni akordis, ke la sekretario redaktu dokumenton rajtigontan al la persono kiu ĉeestos al la kongreso de SAT kiel reprezentanto de HALE dum la venonta jaro.

La Prezidanto legis leteron el Nikolao Ŝil Karbaĝo rekomendantan la sendon al **Ajoblanco** (*blankajlo*, hispana revuo) de raporto pri **Esperanto Hispanio** kaj HALE. La redaktoro de la unua diras, ke li sendos ĝin rete¹.

Ni ankaŭ parolis pri rilatoj inter la hispana satanaro kaj la haleanaro.

La nuna kontosumo de HALE estas **60.898** post la pago de la servoj de **Esperanto Hispanio** (25.000 pesetoj).

Ankaŭ ni akordis sendi gratulan leteron (kiun devos fari la sekretario) al la *Valencia Grupo de Esperanto* okaze de la aĉeto de sia nova sidejo.

Oni aprobis komisiu iun por fari projekton de Kongreso de HALE. Oni pritaksos la sugeston de k-do Pina rilate koincidigi tiujn kongreson kun la *Kultura Semajno Fervojista*.

Malaprobis ni la proponon de k-do Juan Antonio Cabezas Martínez investi parton de la fonduso de HALE pri invest-fonduso banka.

Ne restante pli da aferoj por pritrakti, nia kunveno finis je la unua kaj kvarono.



*La sekretario,
José Pina Tuells*

¹Tio mi jam faris la sekvontan tagon.

SENDUNGEKO KAJ BONFARTA SOCIO,

de Giordano Moya Escayola



Nuntempe, preskaŭ ĉie en la mondo regas la nomata merkata ekonomio kaj multaj industriaj landoj ĝuas altan vivnivelon kaj socialan asekuron neniam antaŭe spertitan. Tamen, en la nomataj bonfartaj socioj la bonfarto ne estas ĝenerala. La sendungiteco kiel kancero forigas parton de la bonfarto kaj plie la eventuala perdo de laborlokoj estas minaco por ĉiuj.

Estas evidente, ke en merkata ekonomio la libera konkurenco forbalaas la nebonajn organizitajn entreprenojn, evitas eksterordinaran profiton kaj permesas la altiĝon de la vivnivelo, sed ankoraŭ la financoj restas sen ia ajn kontrolo kaj plie ekzistas sendungiteco kaj oni ne scias, ne povas aŭ ne volas ĝin solvi, aŭ la solvodon oni volas atingi per fuŝaj rimedoj.

Estas klare, ke subteni la bonfartan socion kune kun sociala asekurado, inklude la sendungitecon, povas fariĝi ekonomie neeltenebla, sed se oni konsideras, ke la sendungitoj estus laborantaj, oni bone povas kompreni, ke la sociala asekurado eĉ povus ampleksiĝi. La modernaj entreprenoj havas la kapablon pliiĝi la produktadon kaj per plimulta

produktado eblas subteni vastan socialan asekuron kune kun la bonfarta socio.

El laborista vidpunkto ŝajnas klare, ke reduktante la laborhorojn, ĉiuj povas esti okupataj, sed oni devas altigi la prezojn, kaj tiu altigo en konkurenca merkato faras, ke oni disvendu malpli da varoj kaj la sendungeco pliiĝas. Teorie, ŝajnas facile solvi la sendungitecon, sed en la realo ne aperas facilaj solvoj.

Antaŭe, la transporto estis multkosta kaj malrapida. Se en alia parto de la mondo oni produktis pli malmultkoste, la prezo de la transporto evitis la konkurencon. Ne ankaŭ la produktado povis tuj kreski, ĉar la tiama tekniko ne estis tiel disvolviĝinta. La tiama granda industrio povis funkcii naciskale kaj esti protektata de doganaj impostoj.

Nuntempe, la granda industriaro estas transnacia, la malgrandaj nacioj ne povas funkciigi propran grandan industrion, la ekonomio planediĝis, kaj retroiri al pasintaj epokoj de nacia fermita komerco ruinigus la bonfartan socion. Oni devas agnoski, ke nuntempe pro la rapideco de la

komunikiloj nia mondo fariĝis kiel unu granda unusola vilaĝo.

Ni imagu kaj konsideru, ke du apudaj urboj, kiel ekzemple Terrassa kaj Sabadell kun similaj grandaj industrioj. Se en Terrassa altiĝus la salajroj, reduktus la laborhorojn, neeviteble oni devus altigi la prezojn de la varoj. Se Sabadell ne agus same, Terrassa spertus industrian ruiniĝon kaj ĝeneralan sendungitecon kaj la sabadellanoj laborus pliajn horojn. La solvo eblas nur kolektive, ke Terrassa kaj Sabadell havu samajn laborajn kondiĉojn.

Se en Francio oni reduktus la laborhorojn kun samaj salajroj oni devus altigi la prezojn de la varoj kaj oni ne disvendus ilin eksterlande. En nacia kadro la sendungiteco akriĝus.

Se Eŭropo unuiĝus federacie simile al Usono, kun sama monerunuoj kaj samaj socialaj kondiĉoj, la sendungiteco estus pli aranĝebla, sed tio, kio nuntempe jam estas nepre

Ŝerce

Odeso, bela ukraina urbo ĉe Nigra Maro konata per siaj ŝercoj, vespere, sur la plaĝo... Laŭ bordo promenadas du odesanon kaj vidas unu homon, kiu dronas en akvo kaj krias de lasta forto:

“Help! Help!..”

La unua odesano ekpuŝas la duan kaj diras: “Ekvidu, kiam la tuta Odeso lernadis naĝi, tiu idoto lernis la anglan lingvon...”

Serĝio Nosov

farenda estas la mondunuiĝo. La solvo de la sendungiteco eblas nur mondscale. Multaj financistoj proponas kiel solvon la reduktadojn de la bonfarta socio kaj de la sociala asekuro por povi konkurenci kun la orientaj landoj en kiuj ankaŭ ili investas kapitalojn. Oriento kaj Okcidento estas hodiaŭ tiel samaj kiel tiuj du apudaj urboj Terrassa kaj Sabadell. La provizora solvo konsistas el egaligo de la socialaj kondiĉoj de Orientaj al tiuj de Okcidento: ne ekspluati infanojn, regado de similaj salajroj kaj havi adekvatan socialan asekuron. Tiam la konkurenco fariĝus lojala kaj egala por ĉiuj.

La mondo ankoraŭ estas organizita laŭ sendependaj naciaj ŝtatoj, kaj tia organizado montriĝas eksepoka.

La laboristoj ankoraŭ pensas rutine kaj ne perceptis, ke je la fino de la dudeka jarcento nia mondo ne estas tia sama, kia de la deknaŭa jarcento, en kiuj naskiĝis la socialaj ideoj, nuntempe disvastigitaj.

La financoj planediĝis, sed la laboristoj agas nur nacie. La sperto montras, ke ne sufiĉas esti laboristo, tiom necesa estas klera laboristaro. Ankoraŭ la laboristoj ne alkitimiĝis al eksternaciaj sentoj, penso kaj agado, kaj la plej multo ankoraŭ ignoras la esperantismon. Dume...

*Giordano Moya.
(Februaro, 1998)*

Nova konstanta songazeto *Pola Stelo*.


Tre versajne ankoraŭ nunjare aperos nova songazeto en E-o kiu konservas la titolon de la ĝisnuna brajla gazeto "Pola Stelo", eldonata de multaj jaroj en Pollando. Pro la tro malgranda nombro da abonantoj la brajla gazeto versajne ĉesos aperi, sed tamen oni volas konservi la ideon de gazeto por nevidantoj, kaj ne nur por nevidantoj, ĉar en la kazo de songazeto ĝi povas esti utila por ĉiuj. Ĉio dependas de tio, ĉu oni kolektos minimume 150 abonantojn. La prezo de la jarabono ne estas precizigita, sed en polaj zlotoj (kompare kun dolaro) ĝi egalos al 28 dolaroj + sendokostoj (minimumaj) por Eŭropo, por ekster-eŭropanoj iom pli da sendokostoj. La sonrevuo estos dissendata 4 fojojn jare el Varsovio, ĉiufoje po 2 kasedoj 90-minutaj. Kaj do jare aperus ok 90-minutaj kasedoj, kies enhavo konsistus el polaj (ĉefe kulturaj), E-movadaj kaj blindulaj temoj (minimume). La proporcion oni prezentos al ĉiuj interesiĝantoj en detala oferto skribe ankoraŭ en aprilo 1998. Krome en ĉiu numero de "Pola Stelo" troviĝus E-intervjuoj el la E-elsendoj de Pola Radio kaj ankaŭ aliaj E-intervjuoj speciale faritaj (ekz. per telefono) por la songazeto. Se la unujara funkciado de la songazeto bone evoluus, oni daurigis ĝin konstate, se ne, oni likvidus ĝin post la realigo de unujaraj abonoj.

La provizorajn antaŭmendojn kolektas:

Pola Radio, Esperanto-Redakcio, 00-977 Varsovio, Poŝtfako 46, Pollando
Fakse (48-22-645-5917). Retpoŝte: pettyn@radio.com.pl.

Kaj krome: Polski Zwiasek Niewidomych, 00-216 Varsovio, ul. Konwiktorska 7, Pollando. Sur la papero per kiu vi provizore antaŭmendos la songazeton, ne skribu aliajn aferojn, kiuj ne rilatas la provizoran abonon. La antaŭmendojn oni sendu kiel eble plej rapide al unu el la indikitaj adresoj. Andrzej Pettyn (en la nomo de la direktoro de Pola Asocio de Nevidantoj - Jan Rodanski) Ĉiuj E-gazetoj, lokaj bultenoj, klubaj informiloj estas petataj kiel eble plej rapide aperi la supran informon por helpi la nevidantajn esperantistojn, sed samtempe por helpi la vidantojn, kiuj per la realigo de la projekto ricevus amason da interesaj sonmaterialoj i.a. pri Universalaj Kongresoj kaj aliaj E-aranĝoj kaj intervjuoj kun ĉefaj movadaj aktivuloj kaj kulturkreantoj.

*Andrzej Pettyn,
Varsouia*



Ĝeŭropradikaj altnivelaj vortoj en Esperanto

Esperanto ja havas superan kapablon en vortderivado, sed ĝishodiaŭaj esperantistoj ne sufiĉe utiligis la kapablon. Kompare kun tia Esperanto, plejparte da altnivelaj vortoj en ĉinliteraj kunmetitaj vortoj, kiujn posedas ne nur la ĉina sed ankaŭ la japana estas derivataj el nur facilaj bazaj vortoj. Ekzemple en la japana jenaj maldekstraj vortoj estas ĉinlitere esprimataj kiel tiuj dekstraj:

biologio sei-bucu-gaku (viv-aj-studo)

paleontologio ko-sei-bucu-gaku (malnov-viv-aj-studo)

homonimo dou-on-i-gi-go (sam-son-malsam-senc-vorto)

sinonimo dou-gi-go (sam-senc-vorto)

Do mezlernejanoj, kiuj scias nur facilajn bazajn vortojn kiel ‘viv’, ‘aj’, ‘stud’, ‘mal’, ‘nov’, ‘sam’, ‘son’, ‘senc’, ‘vort’ kaj tiel plu jam povas konjekti aŭ diveni signifojn de altnivelaj vortoj kiel la supraj. Sed meznivelaj esperantistoj neeŭropanaj, kiuj scias nur facilajn vortojn tute ne povas diveni signifojn de altnivelaj vortoj kiel ‘biologio’, ‘paleontologio’, ‘homonimo’, ‘sinonimo’ kaj tiel plu.

Unu kaŭzo, kial la ĉina (aŭ ĉinliteraj vortoj en la japana) sukcesis fari plejparte da altnivelaj vortoj kiel kunmetaĵoj el nur facilaj bazaj vortoj estas, ke ĉinaj bazaj vortoj inkludas sufiĉe malmulte (unu aŭdu) da silaboj (elparoleroj) kaj do sufiĉe mallonge elparoleblaj. Ekzemple ankaŭ la germana havas tendencon fari altnivelajn vortojn kiel kunmetaĵojn de bazaj vortoj, sed tiaj vortoj ĝenerale fariĝas iom longaj.

(Tiusence Volapük, kies radikoj estas mallongigite faritaj estas eventuale pli avantaĝa en vortderivado ol Esperanto kaj ankaŭ malfacileco diveni signifojn de la radikoj laŭscioj de eŭropaj lingvoj estas pli avantaĝa pri neŭtraleco. Sed Volapük estas pli malavantaĝa pri frazregulo (gramatiko) kaj elparolo ol Esperanto.

Se oni anstataŭigus altnivelajn vortojn en Esperanto per tiaj kunmetitaj vortoj, kelkaj el ili ja estus tro longaj vortoj sed multaj el ili povus esti praktike mallongaj utiligante metebajn vorterojn (‘mal’, ‘-aj’, ‘-ig’, ‘-il’ ktp). Laŭ mi (neeŭropano) tia Esperanto, kies altnivelaj vortoj plejparte estus faritaj kiel kunmetaĵoj de bazaj vortoj estus multe pli alloga kiel internacia lingvo. (Ekzemplojn de tiel kunmetitaj vortoj mi montris en la TTT-paĝo: <http://plaza22.mbn.or.jp/~gthmhk/trmnr-e.html>) Sed ĝis hodiaŭ Esperanto kreskis ne tiom



alloga eble pro tio, ke Zamenhof kaj tiamaj antaŭuloj en Esperantio ne sciis lingvon kiel la ĉinan (dum ili ja eble sciis la germanan). Ĉi tiu fakto ŝajnas al mi ege stranga, ĉar por internacia lingvo ne nur facila lernebleco de frazregulo (gramatiko) sed ankaŭfacila lernebleco de altnivelaj vortoj estu grave konsiderenda afero, ĉu ne? Kompare kun naciaj lingvoj Esperanto estas eble la plej facile lernebla lingvo ja pri frazregulo sed ne pri altnivelaj vortoj. Tamen mi volas kompreni, ke Esperanto, kiu havas historion de cent jaroj ankoraŭ estas survoje al pliinternaciigo. Kompreneble tuj anstataŭigi multe da altnivelaj vortoj estus malfacile sed ni povas almenaŭ eviti uzi kelkajn altnivelajn (kaj ankaŭ por-poemajn) vortojn, anstataŭ tiuj, kiuj troviĝas pli facilaj esprimoj (ekz. ‘aŭtodidakte lerni’ —> ‘mem-lerni’, ‘konversacii’ —> ‘inter-paroli’ ktp). Ni ne faru Esperanton lingvo nur por inteligentuloj, specialistoj aŭ poemverkistoj, kiuj jam havas scion de eŭropa lingvo, sed ni faru Esperanton lingvo pli neŭtrala kaj pli facile lernebla por ĉiuspecaj homoj, ĉu ne?

Mi parolas la Isinomagia-Niponan lingvon kaj riisman Esperanton. TTT-paĝo:<http://plaza22.mbn.or.jp/~gthmhk/>

Pli da informo ĉe <http://plaza22.mbn.or.jp/~gthmhk/trmnr-e.html>.

GOTOU Humihiko
(gthmhk@dc.mbn.or.jp)
Nipono, Miyagi-ken, Sendai-si

ANKORAŬ PRI LA INTERCIVITANA HISPANA MILITO

Nia k-do Petro Levi, kiun mi konas kiel SAT-membro de antaŭ pli ol duonjarcento, verkis interesan artikolon por la februara numero de *Sennaciulo* pri la intercivitana milito, kiun li titolis *Novaĵoj pri la Hispana Milito*, sed honore al la vero nek ekzistas novaĵoj



en tiu artikolo, nek ĝi aldonas ian ajn novan allogon al tiuj historiaj faktoj, kiujn li mencias. Kaj mi ne diras tion kun la malica intenco subtaksi lian artikolon, tute kontraŭe, ĉar ĝi evidentigas, ke iu ajn simpla leganto tute ne konanta la temon, povas trovi gravan malfacilon, ne nur por distingi kiuj estas la novaĵoj kiuj la verkinto indikas en la titolo, sed ankaŭ por kompreno de tio kion li pretendas ekspliki, ĉar ne ekzistas difinoj de la karaktizoj de homoj kaj partioj kiujn li mencias, kvankam tio estus tre facila por li per la simpla lego de la verko *Laboristaj Kronikoj*, eldonita de SAT-Broŝurservo en Beauville en 1996. Do kun la bonvola intenco helpi al la legantaro de *Kajeroj el la Sudo*, kaj se eblas ankaŭ de *Sennaciulo*, mi verkas ĉi tiun artikolon.

Ekzemple, kiam li mencias la partion P.O.U.M. (Laborista Partio por Marksisma Unuiĝo) fondita en Barselono en la jaro 1935, oni devas tuj ekspliki al la legantaro, ke ĝi naskiĝis per kunfandiĝo de du partioj: *Laborista*

Bloko kaj *Komunisma Maldekstro*, surbaze de jena doktrino:

- a) Starigo de provizora proletara diktaturo per armita ribelo.
- b) La popolo libere disponu pri sia propra destino.
- c) Efektiva unuiĝo de ĉiuj politikaj maldekstraj partioj, speciale tiuj Socialista kaj Komunista.

La partio aliĝis al la Komitato por Socialisma Revolucia Unuiĝo, kies sidejo troviĝis tiam en Londono.

POUM estis politika formacio sufiĉe potenca en Katalunio, kun fortaj branĉoj, precipe en Valensjo, Aragono kaj Asturjo. Ĉefaj gvidantoj de la partio estis Andrés Nin, Joaquín Maurin, k.a., sed ĉar en julio 1936, la ĝenerala sekretario, J. Maurin estis kaptita de la naciismaj ribeluloj, okupis tiun plej elstaran postenon Andrés Nin, kies plej gravaj trajtoj jenas:

Andrés Nin naskiĝis en El Vendrell (Taragono) en 1892, kaj profesie laboris kiel instruisto kaj ofte ankaŭ kiel ĵurnalisto. Komence li partoprenis en la katalunaj movadoj naciisma kaj socialisma. Ekde la jaro 1919 li aktivis ĉe la sindikato CNT (Nacia Laborista Konfederacio) kaj ene de ĝi li defendis la rusan revolucion: li vigle partoprenis en la Unua Kongreso de la Internacia Ruĝa Sindikato (ISR), kaj en la Tria Kongreso de la 3-a Internacio, en kiu li

reprezentis la sindikaton CNT. Post tiu kongresoj li restis en Moskvo kiel reprezentanto de la Revoluciaj Sindikataj Komitatoj. Kiel sekvo de arda polemiko tiuepoka pri socialismo en unu sola lando (1925), en kiu k-do Nin esprimis opiniojn kontraŭajn al tiuj de stalinanoj, li revenis en Hispanion en 1929.

En plena politika aktivado, je la komenco de 1936, Andrés Nin estis elektata deputito de la hispana Parlamento, balotita kiel unu el la kandidatoj en la listoj prezenetitaj de la unueca maldekstra bloko Popola Fronto, kaj tuj post la komenciĝo de la hispana intercivilitana milito li okupis gravajn postenojn en diversaj katalunaj oficialaj institucioj. Tio, kion ne multaj personoj scias, inklude kelkaj el liaj biografiistoj, estas, ke Andrés Nin estis esperantisto, bonega esperantisto, kaj lia influo sendube ebligis, ke en la partio kaj ties organo, **Esperanto**, estis ofte kaj fervore propagandata. Nia kamarado Hernández, el Sabadell, feliĉe ankoraŭ vivanta, atestas, ke li aŭdis paroli en mitingo okazinta en Sabadell dum tiu jaro al kamarado Nin, flue kaj altnivele. Kaj mi povas aldoni kiel esploranto pri Esperanto-historiaj temoj, ke laŭ kroniko de Francisco Guitart, Andrés Nin partoprenis en 1918 en esperantista altnivela aranĝo okazinta en la teatro Tivoli el Vendrell, kaj li majstre recitis la monologon L'Escudellometro-n, de Santiago Rusiñol (Hispana Esperantisto, numero 13, januaro 1918).

La aranĝo estis speciale brila pro la alta lingva nivelo kaj kvalito de la programo prezentita!

Andrés Nin estas aŭtoro de pluraj verkoj: Dictaduras de nuestro tiempo (1930, nuntempaj diktaturoj), El proletariado español ante la revolución (1931, la hispana proletaro antaŭ la revolucio); kaj Los movimientos nacionales de emancipación (1932, la naciaj emancipiĝ-movadoj). Okaze de la politikoŝanĝo de Stalin en Rusio, kiam la ruĝa diktatoro volis pereigi la bolŝevisman opozicion (proceso de Moskvo), la rusa diktatoro metis en la nigran liston de malamikoj nepre estingendaj al kamarado Andreo Nin, kiun la agentoj de la diktatoro akuzis, unue, kiel perfidulon al la revolucio kaj kiel sekvon ili enkarcerigis lin en Madrido. Fine la stalinaj ekzekutistoj plenumis la ordonon de sia mastro kaj murdis lin en julio 1937 en la hispana ĉefurbo, en prizono kontrolita de la rusa diktatoro.

La sola sukceso de la politiko de Stalin en Hispanio ne preterpasis la limon de la potenco de la Komunista Partio, sed la alta prezo pagita estis tiel alta, ke mi ne kredas enviinda tiun mizeran renton, ja ĝi semis la dividon de la proletaro en nia lando kaj venenigis ĉiujn komunajn projektojn kaj rilatojn de la kontraŭ-faŝismaj partioj.

Oni ne povas certigi, laŭ intencas esprimi la artikolo de kamarado Levi, ke la partio POUM estis unu el la ĉefaj organizantoj de rezistado kontraŭ la faŝismo, ĉar tio estus troigi la veron kaj trotaksi la realan potencon de tiu partio, eĉ en Katalunio mem, kie ĝi estis pli forta. Oni devas tamen agnoski, ke ĝi posedis bruan propagandon, kaj tiu karakterizo estis sufiĉa motivo por ke,

kiam oni serĉis viktimon pro la evento de majo 1937 en Barcelono (kontraŭrevolucio fare de katalunaj marksistoj) oni decidis ke POUM estu oficiale la sola kulpulo, kaj perforte malaperigis ĝin per tute sovaĝa persekuto fare de la komunistemaj partioj okupantaj en tiu tagoj la povon. Speciale viglis inter tiuj persekutantoj la soveta polico, veninta al Hispanio por kontroli la stalinan *helpon*, obeanta rektajn ordonojn el Moskvo, sed ili ne kuraĝis oficiale akuzi la anarĥiistojn, ĉar ĉi tiuj estis pli multnombraj kaj influaj en popolaj medioj: anarĥiistoj havis ĝustan prestiĝon esti grandaj idealistoj kaj tial amataj de la popolo!

Pri la riproĉoj kontraŭ anarĥiistoj kiel rompintoj de la popolfrota alianco, ne estas malfacile malkovri en ili la venenigan propagandon de la stalin-agentoj, tre efikaj por la kritiko kaj en la prozelitisma fako, kiuj sub tiu preteksto kaj aliaj ne malpli falsaj, ne nur potencigis la Komunistan Partion kaj persekutis anarĥiistojn, sed, iom post iom kaj senpaŭze, konkeris ĉiujn risortojn de la ŝtato kaj de la batalanta armeo. Ekzemplo pri tiuj efektivaj konkeroj estis, nacie, ilia enviciĝo en la tutlanda registaro kaj kontrolo en la armeo de la politikaj komisaroj: internacie, estis la kreo de la Internaciaj Brigadoj, konsistantaj, plej grandparte, el idealistaj homoj el la tuta mondo, kiuj brave batalis en la batalkampo, sed regataj per fera disciplino, preskaŭ ekskluzive, de elstaraj komunistoj: en la plej alta kupolo kiel organizantoj de la I:B. (Prago 26-an julio 1936) estis Thorez, Togliatti kaj José Díaz, ĝeneralaj

sekretarioj de la K.P. de francoj, italoj kaj hispanoj, kiuj muntis la strukturojn de la I.B. po mil milionoj de frankoj provizitaj de sovetaj sindikatoj tiucele. Ĉiu brigado estis ofte komandata de grava komunisto figuro el diversa lando, kiu post la fino de la intercivitana hispana milito famiĝis politike en sia respektiva lando kiel unuaranga politikulo kaj gvidanto de la koncerna K.P., kaj kiel ĉefo de la I.B. la komunisto André Marty.

Grava studinda temo pri la intercivitana hispana milito estis la apliko de originalaj politikoj al la produkt-organizo de la industrio kaj agrokulturo per formuloj konformaj al la ideo de la du plej gravaj sindikatoj: UGT kaj CNT, kiuj prenis sur si la respondecon funkciigi la tutan aparaton produktivan, kiam kapitalistoj kaj entreprenistoj forlasis tiun gvidan taskon en la tuta lando. Ekzemplodona estis la Kolektivigoj de Graus, ĉe Alta Aragono, kaj tiuj de la bordoj de rivero Cinca, historiaj lokoj kun famo socia kaj anarĥiistema influo, ĉar tie estis proklamita en 1934, unuafoje en la mondo, la liberecana komunismo, evento malfacile trovebla en la historio de sociologio. Pli ol unu fojo mi pensis verki kompletan monografion pri tiu temo, sed la malintereso pri sociaj kaj historiaj temoj de niaj laboristaj kamaradoj, kaj la (ni diru kiel eble plej milde) *malvarma* akcepto de mia verko *Laboristaj Kroniko*, konstatabla en la SAT-gvidantaro, konsilis al mi rezigni la projekton. Escepto farita en tiu negativa kadro al nia gekamaradoj Baudé, Vivancos, Juliette Ternant, k.a., kies

oferemon kaj klarajn ideojn pri tiuj temoj montris la diferencon...

Pri tiu laŭdinda okazaĵo, kiun mencias P. Levi, kiam en turisma rondiro tra la hispanaj malliberejoj, trapasante Hispanion survoje al Anglio, sia frato konstatis la kuraĝon de la hispanaj virinoj defiante la gardistojn por ĵeti trans la pikildratoj panon al la malliberaj eksterlandanoj. Mi opinias tion menciinda, sed tio estis normala en lando regata de la tiranio. Pli strange ŝajnas, ke en la jaro 1939 en teritorio de la tiel nomita *franca demokratio*, okazis ion simile pri la hispanaj rifuĝintoj. La sola diferenco estis, ke niaj francaj amikojn, kiuj ĵetis al ni panon trans la pikildratojn, ne riskis perdi la vivon en tiuj solidaraj agoj, sed ne pro tio mi memoras tiun eventon kun malpli da dankemo.

Gekamaradoj, tio kion rakontis al vi nia kamarado P. Levi en la februara numero de *Sennaciulo*, kaj la eksplikoj komplementaj kiujn mi prezentas al vi en tiu ĉi artikolo, vi havas la ŝancon pli amplekse legi en la verko *Laboristaj Kronikoj*, kiu meritis laŭdojn de kompetentaj sociologoj. Ĝi estis eldonata de nia admirata k-do Baudé. La stoko restanta nun ne estas granda, sed nesufiĉa pro la financoj de la Broŝur-Servo de SAT. Multajn aliajn interesajn komentojn pri la Hispana Milito vi povas legi en tiu libro.

Dankon al kamarado Levi, kiu revivigis la temon per sia artikolo. Dankon al vi pro via atento!

Antonio Marco Botella
(Reproduktebla en *Sennaciulo*)

Mortu la junular'!

Oni ne sufiĉe ripetas la jenon: la nivelo malaltiĝas, malsuprenigas, subiras, kaj la junularo ne plu samas, kiel antaŭe. Jen, kiel pruvo, kelkaj elrevigitaj atestoj:

~*Nia junularo estas malbone edukita, ĝi priŝafas la aŭtoritaton kaj neniel respektas al la maljunuloj. Niaj nuntempaj infanoj ne ekstaras, kiam la maljunulo eniras ĉambron, ili rebatas al la gepatroj kaj babiladas anstataŭ labori. Fakte ili estas malbonaj.*

~*Mi neniel plu esperas pri la estonteco de mia lando, se la nuntempa junularo morgaŭ regos, ĉar tiu junularo estas netolereble, senbrida, tio estas, terura.*

~*Nia mondo atingis danĝeran gradon. La infanoj ne plu obeas siajn gepatrojn. La fino de l' mondo tucerte ne foras.*

~*Tia junularo funde elkore putras. La gejunuloj estas malbonfaraj kaj mallaboremaj. Ili neniam estos, kiel estis la antaŭa junularo. La nuntempaj ne kapablos konservi nian kulturon.*

Tio vere veras:

Tamen, ni precizigu la unua el tiuj citaĵoj estas farita de *Sokrato* (470-399 antaŭ Kristo); la dua, de *Heziodo* (720 antaŭ Kristo); la tria, de egipta pastro (2000 antaŭ Kristo); kaj la lastan, pli ol 3000-jaran, oni malkovris sur argilpoto en la babilonaj ruinoj. Kiom rapide pasas la tempo..!

Aperinta en Laŭte, n-ro 134

PRI LA KREDO KAJ DIO

Ĉu ne estus pli bona se la kredo ne ekzistus ĉar la kredo nur rajtfaras la memmorton ĉar ĝi diras ke tie estas vivo post morto?

Se estus post la morto ne vivo, se ĝi dirus ĉi tion, ĝi ne estus pli bona, ĉar nenio volus eniri en la nenion. La kredo de la latinoj kaj grekoj kaj germanoj estis pli bona, ĉar ĉi tie la nebulo ne ekzistis kaj nenion volis fari ili en la eterna submondo, ĉar ĉi tie ili kredis, ke estas malbona. Sed en nia kristana kredo ekzistas la ĉiellando kaj la bono kaj ankaŭ tiu malbona, la ejo de la diablo.

PRI DIO

En la kristana kredo, oni diras ke Dio estas la bono, sed li lasas nin ĉion mortigi kaj li sendas al ni la malsanon kaj la malsaton kaj la frenezo kaj malbonon pli. Kiel ni povas diri ke la Dio estas bona?

Se li sendas al ni ĉion malbonan, kiel oni priskribas en la Sankta Skribo, Iu komprenu ĉi tion. Ankaŭ al la papo li sendas malsanon kaj ankaŭ li devos morti kaj ni ne povas fari ion kontraŭan, sed la kristkreduloj ne devas esti surprizataj, sed ili preĝas: "... Via volo estu farata, kiel en ĉielo tiel sur la tero "

Ĉar ĉi tio estas la afero pri Dio. Ke Dio ekzistas estas verŝajna, sed ke li estas bona, mi vere dubas.

Verŝajne Dio estas nur malgranda ido, kiu ludas pri ni, kaj se li ne ŝatas nin plu, li lasas nin morti.

Dio estas la plej maljuna ido en la tuta universo, ĉar li faras nin problemon ekde ek-ekzisto nia kaj tiu de la tuta homaro. Lian meman filon li lasis morti kaj post tio nenion mi vidas pli bona ekde tiam. Jesuo, la Savisto de ni mortis, male nenio boniĝis. Se vi vidas kion Dio faras pri sia mema popolo, se vi vidas kiel li lasis la nazisocialistoj mortigi ilin, kiel vi povas pensi ke Dio estas bona? Kaj iu diras *Dio estas la amo*. Se lasi memajn homojn morti estas amo, mi ne kredas ke mi bezonas ĉi tion.



Kaj la Savisto diras: *Mia Dio, Mia Dio, kial vi forlasis min?* Certe, mi ne povas kompreni kial li sopiris al Dio. Ĉi tion mi tute ne komprenas, ke mi

lernis ĉe la lernejo ke la Savisto ankaŭ estis Dio. Kial li povis forlasi sin meme?

Ĉi tiun miraklon mi ne povos solvi en mia tuta vivo. Ho Dio, Ho Dio!, kion vi faras? Ne nur bonon vi faras.

Ĉi tio estis nun ĉion, kion mi volis diri.

Mi tre dankas ke vi legis ĝin. Vivu bone!

Matthias Michael Liszt
Vieno




Nia diskaro

Pri homa kaj dia:

poemoj de IBN AL 'ARABI

*Sia tendaro ruiniĝinta
kaj miabruste nemalnoviĝa amo ĉiam
novas,
ruino kaj ploro memoriĝas,
kaj mia amo ĉiam novas.*

Tiel komencas *Mia amo ĉiam
noviĝas*, la unua kanto en *De lo
humano y lo divino* (pri homa kaj dia



afero), kompaktdisko pri poemoj de IBN AL 'ARABI, fama poeto mistika mursja el jarcento XIII-a.

Tiu disko temas pri amo, kiel oni povas konstati per la nomoj de la kantoj: *Mia amo ĉiam noviĝas*, *Religio de amo*, *Princoj de amo*, *Orienta fulmo*, *Amo sieĝita de deziro*, *Iru malrapide kamelista*, *Ho kamelista!*, *Kie ili estas?*, kaj *Kaŝita belo*.

Ĉar ni legis en nia magazino tiun altkvalitan eseon verkitan de kamarado Antonio Marco Botella pri la tajfo de Mursjo, Ibn al 'Arabi ne estas nekonata de ni. Lia poezio simbolis amon kiel rilaton al Dio, kaj sia amatino estis *Nizam*, kiu estas vere Harmonio. Tiuj kantoj en ĉi tiu disko apartenas al libro *Interpretisto de deziroj*, tradukita en la hispanan de Vicente Cantarino kaj tiu de la egiptano Mohamed Reda, doktoro pri Historio de la Islama Penso.



Curro Piñana, la kantisto, estas kartahenano sufiĉe fama en flamenka etoso pro kelkaj premioj, kaj sia voĉo partoprenas de tiu *duende* (koboldo) *flamenka* kiu kutime kunigas konon de ĉiu kanto flamenka kaj naskiĝo en flamenkista familio: sia patro estas ankaŭ kantisto flamenka, kaj siaj fratoj Pepe kaj Carlos estas gitaristoj flamenkaj. Ambaŭ artoj, flamenko kaj *andalusi* (hispanaraba) abunde uzas *melismojn* (koloraturajn, tio estas: pluraj notoj sur nur unu silabo poema), kaj pro tio miksi ambaŭ artojn estas tiel facile kaj premiiga. Se vi ŝatas flamenkon aŭ arabeman muzikon, mi ege konsilas al vi aĉeti tiun kompakton. Signaturo de la disko estas 62056. La *paloj* (flamenkaj formoj) uzataj en tiu registro estas petenero, alboreá, granaína kaj media, tientos, soleá, malagueña kaj verdial, siguiiriya, taranto kaj farruca.

Zoraida de Albaterra

LA RETIRIGO DE LA VOLUNTULOJ INTERNACIAJ-II

La 21-an de septembro D-ro Negrín manifestis en Ginebro antaŭ la Asembleo de la Societo de Nacioj, ke la Hispana Registaro de la Respubliko decidis la retirigon tujan kaj kompletan de ĉiuj batalantoj eksterlandaj, sen distingo de naciecoj, aliĝintaj en la hispana Armeo, post la 18-a de Julio de 1936.

Negrín petis el Societo de Nacioj la starigon de Internacia Komisiono por konstati la retirigon de la eksterlandaj batalantoj.

La Registaro de la Respubliko deziris meti finon per ĉiu tiu unuflanka decido, al ĉiuj mensogaĵoj pri ebla interveno de la Kominterno en la hispana milito, per kio oni pretendis justigi la intervenon militan italo-germanan.

Per la retirigo de la Armeo de la Respubliko de ĉiuj eksterlandanoj, inkluzive de tiuj, kiuj akiris la hispanan naciecon post la 18-a de julio 1936 la registaro de Negrín celis meti al la Societo de Nacioj antaŭ la decido redoni al la Respubliko ĉiujn plenajn rajtojn kiel membro de ĝi, kun la rajto aĉeti militan materialon necesan por sia defendo, rajto kiun ĝuis ĉiuj membroj. Post tiu decido de la Registaro de Negrín, la Societo de Nacioj **ne povis daŭre eviti sian respondecon fronte al la interveno de la faŝista ŝtatoj.**

La retirigo de la brigadistoj estis la respondo plej konkreta al *Plano de retirigo de la eksterlandaj voluntuloj*, adoptita laŭ propono de Anglujo de la Komitato

de Ne-interveno la 5-an de julio de 1938. La menciita *Plano* fakte estis kaŝejo de la kreskanta interveno italo-germana kaj kies celo estis atingi por Franko la statuson de militanto.

Laŭ la angla plano estus sendita al Hispanio internacia komitato kiu zorgus pri la repatriigo de la eksterlandanoj, kaj kiam jam estus retirigitaj de la fronto 10 000 batalantoj de ĉiu armeo, al ambaŭ oni donus la rajton de militado. Poste, oni antaŭvidis restarigi la maran kaj surteran kontrolon en la landolimoj kaj marbordoj hispanaj.

Malgraŭ la mankoj de la plano, la Registaro de la Respubliko ĝin akceptis la 26-an de julio 1938, sed nek Franko nek la registaroj germana kaj itala havis intereson por ĝia realigo. Kio interesis al ili estis daŭrigi la ludon cele trompi la mondan publikan opinionon.

Franko prokrastis ĝis la 16-a de aŭgusto 1938 respondi al Komitato de Ne-interveno. Li akceptis la planon, sed fakte rifuzante ĝin. Li postulis, ke oni rekonuy la rajton al militado senkondiĉe kaj tuje. Nur poste akceptis retirigi *voluntulojn* kaj ne laŭ proporcia numero, kiel postulis la plano, sed 10 000 de ĉiu flanko, kio signifis mokiĝi je la internaciaj organizaĵoj. Nur akceptis la landliman kontrolon, rifuzante tiun maran. Konkrete Franko rifuzadis la anglan planon. ĝi estis alia plia pruvo, ke la faŝistoj ne havis intereson por retirigi la trupojn italajn kaj germanajn el Hispanujo, sed kiu ili ne ovis venki la militon.

Respondante al la peto de Negrín, la Asembleo de la Societo de Nacioj mendis al sia Konsilio la 30-an de septembro 1938, ke ĝi elektu senprokraste la Internacian Komisionon petitan de la Registaro de Hispana Respubliko. Ĉi tiu Komisiono estis konstituita la saman tagon, kaj ties Prezidanto estis Generalo B. Jalander (Finnlando), siaj komisarioj, la generalo brigada Moleswort (Anglujo) kaj kiel sekretario la subkolonelo R. Bach (Francio).

La 16-an de oktobro 1938 alvenis al Barcelona la Internacia Komisiono. En la informo, pli malfrue prezentita antaŭ la Asembleo de Ginebro, konstatis ke la 1-an de septembro 1938 la nomataj Internaciaj Brigadoj fakte estis formacioj miksitaj de eksterlandanoj kaj hispanoj (pro la grandaj perdoj de la Internaciaj Brigadoj), kun proporcio variebla laŭ la kazoj kaj administrataj kiel la ceteraj soldato-grupoj de la hispana armeo, kio estas:

35-a Divizio: 11-a Brigado, 13-A Brigado, 15-A Brigado. **45-a Divizio:** 12-a Brigado, 14-a Brigado, 129 Brigado, Bataliono por fortifikigado. Kvin grupoj de **Artilerio**. Unu grupo de **D.C.A.** (defendo kontraŭ aviadiloj). **Diversaj Servoj:** Sanitara, Administra Sekcio, Komisariato, Rekuperado, Centro de Hospitaloj, kaj tiel plu.

La Respublika Registaro prenis la adekvatajn dispoziciojn por la retirigo de la brigadistoj kaj ilin grupigi en la ariergardo, lasante en ĉiu unuo de la

armeo, aŭ sektoro subordigita nur hispanojn, kion povis konstati la Internacia Komisiono, kiam ĝi alvenis en Hispanion.

La tuto-kvanto de la volontuloj internaciaj ellaborita de la menciita komisiono konsistis en la Zono de Katalunio el 9 843 homoj, kaj en la Zono Centro-Sudo, el 2 830, entute el 12 673, cifero tre proksima al tiu, kiun jam prezentis la Hispana Registaro. (La plej alta cifero de volontuloj de la Respubliko estis 35 000).

La Registaro de la Respubliko sin kompromisis en la deklaro de Ginebro retirigi la volontulojn internaciistajn de la fronto kaj elirigi ilin el Hispanio. Cele plenumi ĉi tiun lastan celon, jam en la monato de oktobro 1938 oni komencis diplomatajn interkonsentojn kun pli ol tridek registaroj. En iuj kazoj, la plilongigo de ĉi tiuj konsulaj formalajoj, fremdaj la la deziroj de la Hispana Registaro, prokrastis la evakuon de la brigadistoj.

La 2-an de novembro 1938 eliris de Hispanio tra Cervera la du unuaj trajnoj kun francaj brigadistoj. La 12-an de januaro la Internacia Komisiono certigis, ke jam estis elirintaj 4 650 kaj alia konvojo kun 1 500 volontuloj kaj alia de 350 estis koncentrigitaj kaj pretaj por eliri. Sub la kontrolo de la Internacia Komisiono estis retirigitaj: 2 400 francoj, 548 usonanoj, 347 belgoj, 13 luksemburgoj, 194 italoj, 80 svisoj, 80 norvegoj, 115 danoj, 182 svedoj, 2 irlandoj, 46 germanoj, 1 aŭstro, 107



angloj, 143 nederlandanoj, 27 finnoj, 1 andorano, 4 ĉilianoj, 3 tangeranoj, 283 poloj, tri grekoj, 20 ĉeĥoj, 1 meksikano, 1 portorikano, 2 bulgaroj, 2 rumanoj, 7 jugoslavoĵoj, 8 hungaroj, 9 sennacianoj, kaj 24 rusoj. Entute 4 650. En la sama informo oni povas legi la jenon:

Post la kontroloj fare de la Internacia Komisiono oni povas konstati, ke la retirigon de la batalantoj nehispanaj oni relaigis fakte laŭ la kondiĉoj disponataj en la plano por retirigi kaj ĝis nun kaj laŭ kontroloj, la Internacia Komisiono povas certigi, ke ne plu ekzistas eksterlandaj batalantoj en la armeo hispana.

Simila omaĝo okazis en Valencio, Madrido kaj en aliaj lokoj kun delegacioj de fabrikoj kaj politikaj organizaĵoj kaj sindikatoj. Dolores Ibarruri dediĉis al la internaciistoj mesaĝon, kiu diris:

Virinoj! Kiam la jaroj forpasos kaj la vundoj de la milito cikatriĝos, kiam la memoro de la dolorigaj kaj sangaj tagoj malaperos kun la realo de la libero, de paco kaj de bonsatetco, kiam la malamo iom post iom mildiĝos kaj la fiereco de la patrio libera havos la saman sencon por ĉiuj hispanoj, parolu al viaj filoj, parolu pri ĉi tiuj homoj de la Internacia Brigadoj.

Rakontu al ili kiel trairante marojn kaj montojn, evitante landolimojn plenajn de bajonetoj, garditajn de rabiaj hundoj, ili alvenis al nia patrio kiel krucmilitistoj de la libero por lukti kaj morti por la libero kaj sendependo de Hispanujo, minacataj de la faŝismo germana kaj itala. Ili

*ĉion forlasis amojn, patrion, hejmojn, fortunon, patrinon, edzinon, fratojn, filojn, venis al ni dirante Ĉi tie ni estas! Via kaŭzo, la kaŭzo de Hispanujo estas nia propra kaŭzo, ĝi estas la **komuna kaŭzo de la tuta homaro antaŭeniranta kaj progresema.***

Hodiaŭ ili foriras, miloj da ili resas ĉi tie havante kiel mortintukon la hispanan teron, kaj la memoron plenan de forta emocio de ĉiuj hispanoj.

Kamaradoj de la Internaciaj Brigadoj! Motivoj politikaj ka ŝtataj kialoj post la realigo de ĉi tiu kaŭzo por kiu vi oferis vian sangon kun nobleco senlima devigas vin reveni al la patrio iuj, por perforta migrado al aliaj. Vi povas foiri fiere...

*Ni ne forgesos vin. Kaj kiam la olivarbo de la paco floras, miksita kun la laŭroj de la venko de la Hispana Respubliko. **REVENU!***

Revenu al nia flanko, ĉi tie vi trovos vian patrion, tiuj, kiuj ne havas patrion, amikojn, tiuj, kiuj devas vivi sen amikeco, kaj al ĉiuj, la amon kaj dankemon de la tuta hispana popolo, kiu hodiaŭ kaj morgaŭ entuziasme krios:

VIVU LA HEROOJ DE LA INTERNACIAJ BRIGADOJ!

*El la hispana:
Luis Serrano Pérez.*

KFD!

24. *Ĉapelitaj signoj estas nenecesa malfacilo, kiun oni notas ĉefe en la modernaj komunikiloj, kiel Internet..*

Ĉapelitaj signoj reprezentas sonojn malsamajn al de tiuj samaj senĉapelitaj signoj. Fakte, ili estas diferencaj literoj el siaj senĉapelitaj paroj, same kiel h estas diferenca ol n aŭ ñ el n. Se Esperanto ne havis tiujn sonojn, ĝi estus malpli riĉa. Tiu solvo uzi du literojn, kiel Zamenoff mem konsilis fari kiam ni ne povus uzi ĉapelitajn literojn (ĉar ni ne manskribas aŭ nia maŝino ne taŭgas), aŭ eĉ tri —tiel, kiel oni faras en aliaj lingvoj, kiel la pola aŭ germana— malfonetikigas la ortografion de la lingvo, estante fonetika lingvo tiu, kiu havas unun solan sonon por ĉiu litero, kaj unun solan literon por ĉiu sono. Tial, se ni forigus ĉapelitajn sonojn, nia lingvo perdus riĉecon, dum se ni uzus digrafikajn rimedojn por reprezenti ilin, la lingvo perdus efikon kaj legi Esperanton komplikiĝus pli.

25. *La sonoj **H** kaj la **Ĥ** estas malfacile prononceblaj, same kiel la sonaj grupoj **sc**, kaj **nkc**.*

Sono de H ekzistas en preskaŭ ĉiu lingvo, kun la notebaj esceptoj pri la hispana kaj itala. Tamen, ĉe larĝaj areoj hispanparolantaj, kiel Andaluzio, Kanariaj Insuloj kaj Sudameriko, sono de esperanta H estas tiu, kiun oni donas al hispana J, kaj tial oni povas konkludi, ke hispana sistemo lingva ne rifuzas tiun sonon. Rilate al Ĥo, tiu estas la sono de

la kastila J, kaj sekve ankaŭ hispana ne rifuzas tiun sonon. Aldone estas aliaj lingvoj kiuj enhavas tiun sonon, kiel la araba, germana, gaela, kaj multaj aliaj. Nur kompatindaj angloj kaj fancoj ne havas ĝin, sed ili povus lerni prononci ĝin rapide tiele: tenu vian langdorson kontraŭ via uvulo, kaj blovu forte: jen ĥo! Tiu sono de H estas ankoraŭ pli facila: imitu hundan spiregadon...

Pri grupoj **sc** kaj **nkc**, vere oni plendas pri sono de c. Sed sufiĉas provi prononci **s** kaj **SAMTEMPE t** kaj perfekta **c** aperiros.

Esperanto estas multe pli facila ol iu ajn lingvo; sed ĝi ankaŭ enhavas difikultajojn. Oni ne malfacile venkas ilin, ĉefe se oni havas bonan profesoron, kaj eĉ la plej malbonaj lernantoj povas sukcesis prononci Esperanton perfekte, ĉar sufiĉas al ili havi konstanteco kaj intereso.

26. *Vi rajtas pri ĉio, kion vi diras; kaj Esperanton oni devus adopti laŭ la tuta planedo. Bedaŭrinde, estas tiom da interesoj, ke ni, kiuj opinias tiel, povas fari nenion por ŝanĝi la malgajan realon: la angla estas altrudinta perforte, kaj ni povas fari nenion..*

Tiu sedo estas la plej kruela, kiun mi iam ajn trovis. Ĉar ĝi neigas al popolo kontrolon pri sia vivo. Ni opinias, ke oni ja povas fari multe pri la afero.

Fundamente, kiu trudas perforte la anglan al hodiaŭa mondo? Veras, ke oni elspezas egajn kvantojn da mono tute ne malindajn por promocii ĝin kaj konvinki

nin, ke sen la angla oni iras nenien. Kaj veras, ke per la angla oni iras malproksimen hodaŭ..., tiuj kiuj regas ĝin, konsentite. La ruzo estas konvinki homojn, ke *ceteruloj* regas ĝin, kaj kiam ili serioze volu, ili regos ĝin ankaŭ. Sed evidentas, ke *normalaj homoj*, tiuj kiuj kutime promenas laŭ niaj stratoj, kiujn ni kutime trovas ĉe kinejoj aŭ koncertejoj, tiuj, kiujn ni vidas ĉe niaj universitatoj -kaj ne nur kiel studentoj- maleblas paroladi angle dum dek minutoj, ne parolante ni pri sia privataj vivoj, pri siaj plej intimaj deziroj. Se jes, okaze la konversacio temos pri ia abstrakta kaj ĝenerala afero, kio facilas multe pli ĉar tiu nivelo lingva estas tre uniforma kaj maldialektiĝita.

Ni esperantistoj adonas du kaj du, kaj malkutime ne faras kvar: se mi ne regas tiun lingvon, se miaj najbaroj ankaŭ ne regas ĝin, ankaŭ miaj kunstudentoj aŭ kuncivitanoj ĝenerale malregas ĝin, mi deduktas, ke tiaj homoj ankaŭ ne regas ĝin en la ceteraj landoj. Tial, oni ne povas. Tiu dedukto povas kuraĝigi nin, ĉar ni subite ekscias, ke ni ne stultas, ke malveras, ke ni ne bonemas pri lingvoj, sed ke lingvoj ĝenerale, kaj la angla aparte, estas malfacilaj, pli malfacilaj ol rego de muzikilo. Sed se ne ni ĉiuj havas humoron aŭ tempon bezonatan por regi pianon aŭ gitaron, kaj tamen post kelkaj horoj da praktiko ni povas regeti bekfluton kaj ludī kelkajn melodiojn. Same, ni povas ankaŭ regeti Esperanton post kelkaj horoj.

Evidente, neniun lingvon -eĉ ne Esperanton- oni povas tute regi. Sed tiujn dek mil aŭ dekdu mil diversajn frazojn per kiuj ni povus resumi nian tutan

ekzistadon ni ja povus lerni kunmeti en Esperanto post pli-malpli mallonga trejnado. Tio ne estas fantazio. Tio estas io, kion praktiko pravas ĉiutage. Kaj tamen, ĝi maleblas per ĉiu ajn alia lingvo. **Ĉar Esperanto estas la plej facila lingvo el la mondo** (kaj tio ne estas troo, sed simpla konstato de fakto).

Post kiam ni jam venkis tiun mensan alkutimigon truditan al ni el televido kaj averteco ĝenerale per malveraj sloganoj kiel tiu, kiu diras *post malpli ol tri monatoj vi lernos la anglan sen studi*, ni povos finfine nomi aferojn per siaj nomoj kaj solvi la problemon.

Kiam ni vidos, ke ni povas kompreni homojn el aliaj kulturoj, kiel litovoj, ĥinoj aŭ maorioj, ĉiuj tiuj mensaj baroj ekfalos. Veras, ke ni ne povos rilati kun mil miljonoj da homoj per Esperanto. Sed se ni scipovus la ĥinan, ni ankaŭ ne povus. Ĉar la nombro da personoj, kiujn ni povas koni persone dum tuta nia vivo estas tre limigita, kaj tiu ne preterpasas kelkajn centojn. Sed nin povas komforti scii, ke se bezonate, post dekoj da trejnadhoroj, oni povas komprenigi sin per Esperanto.

Mi kredas, ke tio estas argumento tre klara pri kio estas tio, kion ni povas fari por turnigi dorse faktojn ŝajne stabilitaj hodiaŭ. Ni vidas je televido ministrojn parolante la anglan en la novaĵoj. Sed ilia angla estas kompatinda, kaj ili certe preferus paroli sian propran lingvon.

Ĉu ni defendos rajton de forto, aŭ ĉu ni sentas nin sufiĉe fortaj por demandi la ununura etika solvo?

*Daŭrigota de
Olga López*

Levante esperanta,**Vivo kaj muziko de Francisco Tárrega** estis temo

de tiu prelego, kiun mi diris dum la pasinta 9-a Kongreso de VEFkM en Kasteljono, la 4-an de aprilo de 1998.

Ĉar multaj geamikoj ne povis iri

ĉiuokaze vi alvenos el menciitaj adresoj. Por angloj ankaŭ estas paĝo (**tarreng.htm**) al kiu oni alvenos ankaŭ el la esperanta versio.



Aŭtoro de skulptaĵo, prezidanto Cabezas kaj Vicurbestro aŭskultas, dum Francisco Conejero inaŭguras esperante kaj Mercedes tradukas .

tien, sed mi scias, ke li ŝatus legi ĝin, sed ne restante sufiĉe da loko ĉi tie, mi invitas al vi ĉiuj legi ĝin -kaj **aŭskulti-** per TTT paĝo ĉe adreso <http://www.districto.com/esperanto/tarrego.htm> aŭ <http://www.dragonfire.net/~Esperanto/tarrego.htm>. Se vi ne tre bone regas Esperanton, estas ankaŭ hispana versio **tarresp.htm**, al kiu

Sed estis aliaj okazaĵoj pli gravaj dum tiu kongreso: **Placo de Esperanto** kreiĝis en ĉefurbo Kasteljono la 4-an de aprilo 1998. Tio estas gravega okazo kaj granda sukceso farita de kasteljonaj samideanoj. Ekde nun, ĉiuj kasteljonanoj kaj vizitantoj scios pri Esperanto, eĉ se ili ne bezonas ĝin.

La monumento staranta meze de la *Placo de Esperanto* estas ŝtona, kaj reprezentas nian planedon ĉirkaŭitan

de zono diranta *Universala Lingvo*. Sub la mondo estas du radioj kiuj venas el du manoj malfermantaj.

Sub tiu bildo estas averto kun la nomo de la skulptisto, Francisco Ferragut, kaj la dato de la okazo, la 4-an de aprilo de 1998.

Ankaŭ mi prelegis dimanĉe pri *El síndrome de Babel*, hispane. Fakte tiu prelego estas digesto de tiu mirinda libro verkita de Claude Piron, *Le défi des langues*, kune kun miaj personaj travivaĵoj kiel kaj esperantisto kaj profesia instruisto pri la angla dum pli ol dudek jaroj. La prelegon mem konas S-ro Piron, kiu aprobis la enhavon. Vi trovos tiun prelegon -bedaŭrinde nur hispane, kvankam mi planas esperantan version- en Internet ĉe <http://www.districto.com/esperanto/sindrome.htm>.

Mi bedaŭris, ke ne okazis la programita vizito al *Ekologia domo*, pro manko da tempo. Nin regalis, tamen, muzikistoj lokaj *Voĉoj kaj lumoj*, kiuj ludis *bolerojn* por ni dum pli ol du horoj ĉe la urba teatro, sabaton, kaj ankaŭ dimanĉe infano Tomás Fabregat ludis sian violonon por ni, akompanita de sia patro. Ĝi estis kortusa koncerto en kiu ne mankis *La Espero* de Ménil, kompreneble.

Sed la ĉefa evento en tiu kongreso estis la gravaj decidoj atingitaj de ni dum nia Ĝenerala Asembleo, pri kiu

la prezidanto informos en la venonta numero de *Kajeroj el la Sudo* aŭ *El Correo del Esperanto*.

Jesuo



La Esperanto-Grupo de Bilbao kaj vero.

La Esperanto-grupo de Bilbao asertas, en sia bulteno *Nia Ponto* (marto de 1998), ke ne ekzistas en Hispanio minimume bone -kaj do rekomendinda- Esperanto- informilo nacilingva. Tio ne nur ne veras, sed estas insultema al agado de kelkaj samideanoj, kiujn mi konas kaj subtenas en ilia agado por Esperanto. Ekde du jaroj ekzistas *El Correo del Esperanto*, kiun HEF rifuzis agnoski ĝis nun. En la pasinta jarkunveno de HEF oni demandis al la tiama estonto HEF-estraro pri ilia sinteno pri la sola hispanverkita magazino kiu parolas pri Esperanto, kaj ili diris, ke ili ne ankoraŭ havis tempon pritrakti la aferon. Ankaŭ ili ne havis programon, kvankam ili devis improvizi tie intencaron antaŭ la asembleo. Sed jaro pasis, kaj ankoraŭ ne estas deklaracio de HEF pri la afero. Ankaŭ *Esperanto España*, eble la plej granda TTT-paĝo pri Esperanto (pli ol 17 megoj) restas senagnoskita de HEF eĉ se ĝi estas en tri servistoj kaj havis jam pli ol 12 000 legojn. Mi opinias, ke oni devas kunlabori, ne jaluzi. Tiel, ni iras nenien.

La redaktoro.

Kajeroj _____



_____ **el la Sudo**

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

**REDAKCIO: Poŝtkesto 4461,
E30080 MURCIA,
HISPANIO**

**Retskribu al
hale@distrito.com**

<http://www.distrito.com/esperanto/kajeroj.htm>

<http://www.dragonfire.net/~Esperanto/kajeroj.htm>

Depósito legal: Z-2398-88

Presejo: Alegría.